SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO

# Aktuale

SEJM

Esperanto servu pacen!

AKTUALE

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1977/78 N-o 10(54) Junio - julio

REZULTOJ DE LA SOCIALISMA KONKURADO
dum la unua periodo de la agadjaro 1977/78
(laŭ raportoj, venintaj antaŭ la 1-a de junio 1978)

R a n g l i s t o j  d e  k a t e g o r i o j

Kategorio "A"

1. Klaipeda.....980
2. Krasnojarsk..795
3. Riga.........545
4. Ufa..........398
5. Tjumenj......395
6.-7. Omsk........0
Vilnius.....0

Kategorio "B"

1. Ivanovo......516
2. Moskvo.......461
3. Kievo........442
4. Miass........429
5. Ŝalavat......348
6. Ĥarkov.......347
7. Tiĥvin.......188
8. Leningrad......0

Kategorio "C"

1. Zaporoĵje.................518
2. Angarsk...................437
3. Doneck....................366
4. Barnaul...................335
5. Meĵdureĉensk..............323
6. Novosibirsk...............302
7. Kujbiŝev..................295
8. Petropavlovsk-Kamĉatskij..184
9. Ĥmelnickij................181
10. Soĉi.....................175
11. Permj....................133
12. Magnitogorsk.............104
13. Novomoskovsk..............92
14.-20. Celjabinsk.............0
Kaunas.................0
Maĥaĉkala..............0
Rostov-Don.............0
Sizranj................0
Talgar.................0
Ustj-Kamenogorsk.......0

**Kluboj-kandidatoj**

1. Lvov.........396
2. Sterlitamak..212
3. Siktivkar....153
4. Viljandi.....128
5.-9. Jerevan.....0
Kapsukas....0
Liepaja.....0
Pärnu.......0
Tula........0

G e n e r a l a   r a n g l i s t o

1. Klaipeda..........................980
2. Krasnojarsk.......................795
3. Riga..............................545
4. Zaporoĵje.........................518
5. Ivanovo...........................516
6. Moskvo............................461
7. Kievo.............................442
8. Angarsk...........................437
9. Miass.............................429
10. Ufa..............................398
11. Tjumenj..........................395
12. Lvov.............................386
13. Doneck...........................366
14. Ŝalavat..........................348
15. Ĥarkov...........................347
16. Barnaul..........................335
17. Meĵdureĉensk.....................323
18. Novosibirsk......................302
19. Kujbiŝev.........................295
20. Sterlitamak......................212
21. Tiĥvin...........................188
22. Petropavlovsk-Kamĉatskij.........184
23. Ĥmelnickij.......................181
24. Soĉi.............................175
25. Siktivkar........................153
26. Permj............................133
27. Viljandi.........................128
28. Magnitogorsk.....................104
29. Novomoskovsk......................92
30.-44. Ĉeljabinsk....................0
Jerevan...........................0
Kapsukas..........................0
Kaunas............................0
Leningrad.........................0
Liepaja...........................0
Maĥaĉkala.........................0
Omsk..............................0
Pärnu.............................0
Rostov-Don........................0
Sizranj...........................0
Talgar............................0
Tula..............................0
Ustj-Kamenogorsk..................0
Vilnius...........................0

Agado de la kluboj, ĉe kiuj staras nuloj, certe ne estas nula, sed ili ne trovis tempon por raporti. Ĉu tiu laboro estas tiom malfacila?

P.Jegorovas, v/p pri sekretariaj aferoj.

# RENKONTE AL LA SEJM-KONFERENCO

En novaj kondiĉoj, kiam E-movadon en Sovetunio oni taksas alie ol antaŭe, la graveco de SEJM plialtiĝas. Ni dume estas sola landskale organizita kolektivo, kaj nun ni devas la/bori eĉ pli firme kaj fruktodone, pruvante la taŭgecon de niaj organizaj metodoj. Antaŭ nia forumo. la jam 12-a SEJM-Konferenco, ĉiuj aktivuloj pripensu realajn proponojn, pritaksu freŝajn ideojn, sobre rigardante tra la spektro de novaj kondiĉoj kaj eblecoj, ne troigante kaj ne konstruante aerajn kastelojn. Trarigardu viajn malnovajn kajerojn, eble tie troviĝos multaj ideoj, kiuj siatempe estis utopiaj aŭ tro larĝaj kaj tial ne realigeblaj tiam, sed eventuale taŭgaj nun.

SEJM-reprezentantoj, raportante pri la kluba agado, akcentu jenajn demandojn: 1) soci-utila laboro de la klubo; 2) internacia agado de la klubo; 3) eduko de la klubanoj en spirito de proleta internaciismo; 4) agadplanoj por la nova jaro en novaj kondiĉoj; 5) malfacilaĵoj en la kluba agado. La raportoj estu koncizaj (ne pli ol 5 minutoj). Por plifaciligi la protokoladon, SEJM-reprezentantoj kaj fakestroj prezentu la raportojn ankaŭ skribe.

Do preparu viajn proponojn kaj ideojn, por ke la 12-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro, dediĉita al la 60-jara jubileo de Komsomolo, trapasu vigle kaj fruktodone.

Estas proponata jena proksimuma plano de la Konferenco:

**L a u n u a t a g o - 1 4 . 7 .**

| | |
|---|---|
| Matene: | Veno kaj registriĝo, organiza kunveno. |
| Posttagmeze: | Malfermo de la Konferenco. |
| | Celoj de E-movado en Sovetunio (A.Melnikov). |
| | Raportoj de SEJM-kluboj pri la agado dum la agadjaro. |
| Vespere: | Disputo "Kiel viaj klubanoj propagandas la soveta ideologion eksterlande?" |

**L a d u a t a g o - 1 5 . 7 .**

| | |
|---|---|
| Matene: | Daŭrigo de la klubaj raportoj. |
| | Internacia laboro en SEJM, rilatoj de SEJM kun eksterlandaj E-junularaj organizaĵoj, celoj de la SEJM-delegita reto (A.Medinŝ). |
| Posttagmeze: | Interna informado en SEJM, planoj por novaj kondiĉoj (V.Aroloviĉ, V.Ŝilas). |
| | Signifo de E-renkontiĝoj (L.Novikova). Raportoj pri plej enhavriĉaj renkontiĝoj. |
| Vespere: | Disputo "Kion por SEJM signifas Asocio de Sovetaj Esperantistoj?". |

**L a t r i a t a g o - 1 6 . 7 .**

| | |
|---|---|
| Matene: | Financa agado en SEJM (D.Cibulevskij). |
| | Faka agado en SEJM (V.Sapoĵnikov). Akcepto de Regularo por fakoj de SEJM. |
| Posttagmeze: | Laboro de popularigа fako, celoj kaj manieroj de agado en kadroj de ASE (A.Kuprienko). |
| Vespere: | Rememoroj de SEJM-aktivuloj pri 12-jara agado. |

**L a k v a r a t a g o - 1 7 . 7 .**

| | |
|---|---|
| Matene: | Eksterplana aranĝo (eventuale). |
| Posttagmeze: | Agado de SEJM-kluboj laŭ vidpunkto de SEJM-Sekretario (P.Jegorovas). Honorigo de kluboj - venkintoj en la socialisma konkurado. |
| Vespere: | Libertema disputo. |

**L a k v i n a t a g o - 1 8 . 7 .**

| | |
|---|---|
| Matene: | Reelekto de SEJM-Komitato kaj fakestroj. |
| Posttagmeze: | Akcepto de Decidoj. |
| | Fermo de la Konferenco. |
| Vespere: | Interŝanĝo de impresoj pri la Konferenco. |

A.Medinŝ, unua vicprezidanto de SEJM.

INFORMILON PRI LA KONFERENCO LEGU SUR LA PAĜO 130!

# REGULARO POR FAKOJ DE SEJM
(projekto)

## I. FAKOJ

1. En SEJM estas fondataj fakoj laŭ direktoj de la agado kaj laŭ interesoj de la esperantistaro.
2. Fondon kaj likvidon de ĉiu fako aprobas SEJM-Konferenco.
3. Ĉiu fako devas havi strukturon por efektiva organizo de la agado. Estas rekomendataj jenaj subfakaj unuoj (laŭ la subdirektoj):
a) servoj;
b) sekcioj, grupoj;
c) komisionoj (konstantaj kaj provizoraj).
4. La taskojn de konkreta fako fiksas SEJM-Konferenco aŭ la Komitato de SEJM.

## II. FAKESTROJ

1. Estro de ĉiu fako estas elektata dum SEJM-Konferenco.
2. Ĉiu fakestro senpere subiĝas al la vicprezidanto de SEJM pri fakaj aferoj.
3. Fakestro devas konstante informi la vicprezidanton pri laboro de la fako, pri ĉiuj problemoj de la agado.
4. Ĉiujare (ĝis fino de majo) fakestroj raportas pri la agado de la fako laŭ Taksa Demandaro al la vicprezidanto.
5. Plej ĉefa devo de fakestro estas organiza laboro por la fako: varbado de kunlaborantoj, aktiva informado, struktura organizigo de la fako, ellaboro de la laborplano kaj kontrolo de ĝia plenumado ktp.
6. Fakestro devas eduki E-aktivularon en sfero de la faka agado kaj prepari spertajn anstataŭontojn.
7. Fakestro de SEJM devas propagandi sian fakon uzante ĉiujn rimedojn. Li devas subteni nepran kontakton kun informiloj de SEJM.

## III. ROLO DE LA SEJM-KLUBOJ EN LA FAKA SISTEMO

1. SEJM-reprezentantoj de la kluboj senpere helpas al fakestroj de SEJM pri varbado de la kunlaborantoj en siaj kluboj.
2. Ĉiu klubo de SEJM devas havi po unu respondeculon - kunlaboranton por ĉiu fako de SEJM. Se la kunlaborantoj ne troviĝas, SEJM-reprezentanto indikas la respondeculojn por kontaktado inter fakoj kaj la klubo, aŭ mem efektivigas la kontaktojn.
3. SEJM-reprezentantoj kontrolas interkontaktadon de la respondeculoj kaj fakoj.

## IV. KUNLABORANTOJ

1. La fakoj povas havi unu kategorion de la membreco: kunlaborantoj.
2. Fakestro kontaktas kun kunlaborantoj el ĉiu klubo pere de respondeculo pri kontaktado (elektata el inter la klubaj kunlaborantoj).
3. La respondeculo organizas en la klubo agadon de la kunlaborantoj, informas ilin (ankaŭ la klubanaron) pri direktivoj de la fakestro kaj agado de la fako, informas la fakestron pri agado de la grupo (aŭ pri la sia, se li estas sola kunlaboranto en la klubo), helpas varbi novajn kunlaborantojn en la klubo.
4. La elektitaj fakestroj kaj kunlaborantoj per varbado formas laborgrupojn el membroj de SEJM-kluboj, el subtenantoj de SEJM kaj aliaj esperantistoj.

V. INTERNA INFORMADO EN LA FAKA SISTEMO DE SEJM

1. Fakoj uzas informilojn de SEJM ("Aktuale", "Kurte") por informi pri sia agado, varbi kunlaborantojn, organizi la fakajn aktivecojn ktp.

2. Fako rajtas eldoni propran informilon, se konsideras tion ĝi bezonata kaj havas por tio la eblecojn.

3. Fakestro kontaktas kun kunlaborantoj (respondeculoj) kaj kluboj (SEJM-reprezentantoj) per privataj kaj cirkuleraj leteroj.

VI. SOCIALISMA KONKURADO

1. Por plivigligi laboron de la fakoj, por ili en SEJM estas organizata socialisma konkurado.

2. Laŭ raportoj de la fakestroj SEJM-Komitato premias la unuajn tri fakojn. La premiojn ricevadas la fakestroj, kiuj siavice premias plej bonajn siajn kunlaborantojn.

3. La raportojn oni kompilas laŭ speciala Taksa Demandaro.

TAKSA DEMANDARO
POR SOCIALISMA KONKURADO INTER FAKOJ DE SEJM

| | |
|---|---|
| 1. Organizo de faka renkontiĝo | 30 |
| por ĉiu partoprenanto | 1 |
| 2. Prelego pri faka temo: | |
| a) antaŭ esperantistoj | 5 |
| b) antaŭ neesperantistoj | 10 |
| 3. Kontaktoj kun oficialaj instancoj pri la fakaj aferoj: | |
| a) perleteraj, por ĉiu respondita letero | 2 |
| b) renkontaj, por ĉiu renkontiĝo | 5 |
| 4. Kvanto de la kunlaborantoj (la liston prezenti) | |
| por ĉiu kunlaboranto | 1 |
| 5. "Aktuale" - publikaĵo pri faka temo: | |
| a) artikolo problema | 20 |
| b) artikolo informa | 10 |
| c) sciigo | 4 |
| 6. Informo en "Kurte" pri faka temo | 3 |
| 7. Sciigo pri faka agado en eksterlanda gazetaro, radio | 10 |
| 8. "Amikeco" - publikaĵo pri faka temo: | |
| a) artikolo | 10 |
| b) sciigo | 5 |
| 9. Organizo de faka ekspozicio: | |
| a) por esperantistoj | 5 |
| b) por neesperantistoj | 10 |
| 10. Eldono de la faka informilo, por ĉiu numero | 5 |
| 11. Eksterlandaj (korespond)ligoj kun la fakuloj kaj parencaj organizaĵoj, por unu | 3 |
| 12. Partopreno en eksterlanda faka renkontiĝo, por unu partoprenanto | 20 |
| 13. Artikoloj, sciigoj en soveta gazetaro, radio, televido pri la faka temo: | |
| a) tutsovetiaj | 30 |
| b) respublikaj, regionaj, distriktaj | 20 |
| c) oficejaj, institutaj, uzinaj | 10 |
| 14. Unikaj aktivecoj de la fako | |

RIMARKOJ: a) kun la raporto la fakestro kunsendas liston de la kunlaborantoj, planon de la laboro kun indiko de la plenumitaj planeroj, liston de premiendaj kunlaborantoj, priskribon de struktura organizo de la fako; b) la poentojn por laboro, plenumita memstare, la fakestro rajtas ankaŭ aldoni al raporto de la klubo, kies membro li estas.

Kompilis V.Sapoĵnikov, v/p de SEJM pri fakaj aferoj.

LISTO DE LABOROJ EN OkSEJT-20

1. Adiaŭa balo, elekto de "Miss kaj Mister Esperanto". 2. Akiro de revenaj biletoj - M.Aĥlakov. 3. Alveno de la tendaranoj: a) renkonto; b) registrado - Z.Aĥlakova; c) enloĝigo - V.Rusanov. 4. Biblioteko. 5. Butiko - E.Bogoslovskaja. 6. Deĵorado - V.Rusanov: a) kuirejo; b) tendarejo; c) fajrejo. 7. Ekskursoj - M.Aĥlakov (aŭtobusoj), A.Junusov (ĉicerono). 8. Ekspozicioj (organizi). 9. Ekzamena komisiono. 10. E-Universitato. 11. Festoj: a) de naskiĝintoj - G. Bogoslovskaja; b) Neptuna - A.Junusov. 12. Fotoservo, komuna fotado. 13. Gaja vespero. 14. Gimnastiko matena. 15. "Hej do, junulinoj!". 16. "Hej do, junuloj!". 17. Interkona vespero - G.Bogoslovskaja. 18. Klubo de Gajaj kaj Spritaj. 19. Koncertoj. 20. Konkursoj: a) "Kion vi scias pri Dagestano?" - A.Junusov, G.Bogoslovskaja; b) de bela lego; c) interpretista. 21. Labortago en kolĥozo - M.Aĥlakov. 22. Loterio. 23. Medicina servo. 24. Mitingoj: a) 60-jariĝo de VLKSM - M.Aĥlakov; b) Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. 25. Murgazeto. 26. Paroligaj kursoj. 27. Poezia vespero. 28. Posttendaro. 29. Regionaj kunvenoj. 30. Renkonto kun loĝantaro - M.Aĥlakov. 31. Seminarioj: a) pedagogia; b) primovada; c) ĵurnalista - A.Junusov. 32. Sociologia enketado. 33. Solena malfermo - A.Junusov. 34. Somera prelegejo. 35. Sportkonkuroj. 36. Tajpado. 37. Tradukista kurso. 38. Verda milico. 39. Vesperaj ludoj.

Ĉiu partoprenonta la tendaron devas laŭeble anticipe sciigi, pri kiu tendara tasko li (ŝi) volus okupiĝi.

Prepara Komitato de OkSEJT-20.

BELARTA FAKO ANTAŬENMARŜAS

Por kolekti kunlaborantojn en la novkreita Belarta fako, mi uzis septembre tri eblajn rimedojn: skribis ĉ. 20 personajn leterojn, aperigis artikolon en "Aktuale" kaj anonceton en "Kurte". Rezulte venis 9 reeĥoj al la personaj leteroj, 3 al la anonceto kaj 1 al la artikolo. Kolektiĝis do grupeto da SEJM-anoj kaj subtenantoj, preskaŭ agi samdirekte. Kun plejmulto el tiuj 13 personoj mi havas viglan laboran kontakton ĝis nun, kaj nome pro tio mi kuraĝas diri nun, ke la Belarta fako komencis sian funkciadon.

Ankoraŭ ne venis tempo por analizi eĉ la unuajn rezultojn de la laboro; lasu ni tion por la baldaŭa Konferenco. Tamen mi ricevis kelkajn leterojn, en kiuj ripetiĝas la samaj demandoj. Mi opinias, ke tiuj demandoj interesas multajn, kaj decidis respondi sur paĝoj de "Aktuale".

<u>1. Kiuspecan kunlaboron bezonas la fako?</u>

Unuavica tasko de la fako estas aktivigo de belarta agado inter E-junularo. Tion ni povas atingi ĉefe per edukado, spertointerŝanĝo kaj aperigo de la plej bonaj belartaj verkoj en diversaj eldonaĵoj. Konforme al la tasko estas ĉefe bezonata kunlaboro de ĉiuj aŭtoroj kaj tradukistoj de poeziaĵoj kaj kantoj, kies verkojn mi ĉiam akceptas. Krom tio, ne estas dume sufiĉa helpo de <u>spertaj</u> aŭtoroj, tra-

dukistoj kaj muzikistoj (estas inter ni kelkaj komencantaj komponistoj, kies melodiojn mi ankaŭ akceptas) pri redaktado de la venantaj materialoj. Lastatempe, lige kun preparado de la unuaj belartaj eldonoj, aperis novaj bezonoj: necesas helpo de pentristoj kaj tajpistoj. Por eblaj deziirantoj kunlabori mi memorigas la adreson, kie la sinproponoj estas ĉiam atendataj: 187500 Leningradskaja obl., Tiĥvin, ab. jaŝĉik 2.

2. Ĉu la fako kunlaboras kun "Amikeco"?

Jes. Responde al la letero de la nova redaktoro de "Amikeco", nun estas preparata stoko da materialoj por tiu ĉi eldonaĵo.

3. Ĉu aperos ĉi-jare iuj memstaraj eldonaĵoj de la fako?

Nuntempe E-klubo "Juneco" en Vilnius preparas por eldono premiitajn konkursaĵojn de "Muzo-77". Tradicie ili verŝajne aperos proksime al la Konferenco. Samtempe estas preparata kolekto de la verkoj kaj tradukoj, venkintaj dum la junaj orientaj konkursoj - "Liro" kaj "Oriento". Ankaŭ ĝi devas aperi ĝis aŭgusto.

4. Sed la nova kantaro?..

Ĝi ne aperos en 1978, ĉar la laboro pri ĝi estas komencita de nulo. La eksestro de la ekzistinta antaŭe kanta fako, onidire kolektinta pli ol 200 kantojn, ne reeĥis ĝis nun.

Tamen mi jam kolektis multajn kantojn, kaj ilia kvanto konstante kreskas. La kantaro aperos. Ŝajnas al mi, ke unuavice devas aperi la kantoj plej popularaj, sed nenie publikigitaj. Por elekti tiujn mi petas helpon de ĉiuj kluboj. Skribu, geamikoj, kiujn kantojn vi volus trovi en la kantaro, kaj mi penos kontentigi viajn dezirojn.

Estas ankaŭ unu fakto ĝojinda por kantemuloj. Tre kantoabundaj estis la orientaj konkursoj. Pro tio en la kolekton "Liro - Oriento" eniros multaj kantoj, kiuj iom kontentigos la soifantojn.

M.Bronŝtejn, la fakestro.

## ATENTON AL INTERLINGVISTIKO!

Estas malfacile supertaksi signifon de interlingvistika laboro por E-movado. Tial antaŭ jaro kaj duono en SEJM estis fondita Interlingvistika fako. Koncize, dume estas farita jeno:

- Estas ellaborita programo de interlingvistika kurso, konfirmita en la Baŝkiria universitato.
- La programo estas dissendita al cento da universitatoj kaj pedagogiaj institutoj, venis multaj reeĥoj.
- En la Baŝkiria universitato okazis du oficialaj devigaj kursoj de interlingvistiko, kiujn finis 21 personoj en 1977 kaj 56 en 1978.
- Estas faritaj prelegoj pri interlingvistiko (dum inter-altlerneja seminario de lingvistoj en Ufa), pri lingvaj baroj en scienco (dum urala tradukista konferenco en Ĉeljabinsk).
- Estas faritaj prelegoj pri interlingvistikaj temoj en OrSEJT-19.
- Estas menditaj kaj aĉetitaj kserokopioj de pluraj numeroj de la revuo "La monda lingvo-problemo", mikrofilmoj de kelkaj gravaj libroj kaj artikoloj.
- Estas tradukita ruslingven prelegaro de Detlev Blanke (fare de T.Kaminina) kaj esperantlingven du artikoloj el "La monda lingvo-problemo" (fare de S.V.Galkin).
- Okazis pluraj interlingvistikaj prelegoj en studentaj sciencaj konferencoj (Barnaul, Samarkand, Krasnojarsk, Pskov, Kiev). Pluraj studentoj laboras pri diversaj interlingvistikaj temoj.
- Estas sukcese defenditaj du diplomaj verkoj pri interlingvistikaj temoj (P.Jegorovas en la Vilniusa universitato kaj D Mametova

en la Tjumena universitato). Al ambaŭ estas donita helpo per literaturo. Prepariĝas al diploma verko S.Klimenko (Alma-Ata).

- Daŭris prilaborado de E-lernolibro.

- Estas starigitaj firmaj kontaktoj kun elstaraj interlingvistoj el diversaj landoj.

- Estas preparita prelego por Esperantologia konferenco dum la 63-a UK de Esperanto en Varna.

- Estis provoj kontakti VINITI kaj Tutunian centron de tradukado.

- Estas verkata artikolo por la revuo "Ĥimija i ĵiznj".

- Estas verkita artikolo por la revuo "Junostj".

- Estas publikigitaj priesperantaj artikoloj en ĵurnaloj de pluraj regionoj de la lando.

- Estas publikigita artikolo pri interlingvistiko en "Aktuale".

Perspektivoj:

- Fondi kaj gvidi grupon por kolekti derivitajn vortojn, ne registritajn en vortaroj (dezirantoj okupiĝi pri tiu facila, sed ege interesa kaj grava laboro turnu sin al mi por instrukcioj).

- Traduki esperanten aŭ rusen gravajn interlingvistikajn artikolojn el okcidentaj lingvoj (dezirantoj traduki kaj tajpi turnu sin al mi).

- Gvidi interlingvistikajn esplorojn ( dezirantoj povas ricevi ĉe mi temojn kaj laŭeblan helpon).

- En la nova studjaro okazigi devigan interlingvistikan kurson en la Baŝkiria universitato.

- Ebligi al ĉiuj dezirantoj ricevi interlingvistikajn materialojn ĉu provizore, ĉu kopie.

B.Kolker, estro de la Interlingvistika fako.

## FAKOJ DE SEJM: KIEL ESTOS PLU?

Ankoraŭ unu agadjaro proksimiĝas al la fino. Se mi diros, ke ĉi-jare en rolo de la vicprezidanto mi aspektis pale, do verŝajne mi pretiĝu esti "batata" dum la Konferenco...

En SEJM-Komitato mi tamen laboris: cirkuleris, partoprenis la kunsidojn, ion proponis, iel esprimis miajn opiniojn pri diversaj pridiskutataj problemoj. Tiutempe la fakestroj agis... aŭ - ne agis - kiel ĉiam. Tiel estis, tiel estas. Ĉu tiel restos? Mia provo ekkontakti kun disciplinemaj fakestroj trovis sufiĉe kutiman reagon: informis min pri sia agado nur triono de fakestroj - fakte tiuj, kiuj provis labori ĉi-jare. Do ni povas konstati: la restaj du trionoj aŭ ne laboris, aŭ... reagis al miaj maloftaj leteroj.

Kion do ni konkludu? Ĉu likvidi la fakojn? Aŭ ŝanĝi la fakestrojn? Aŭ eĉ pli bone - ŝanĝi la vicprezidanton?..

M.Bronŝtejn (Tiĥvin) en sia artikolo "Ĉu en la klubo aŭ en SEJM?" ("A" N-8) tuŝis gravan problemon, pri kiu mi volus esprimi propran opinion.

Unue, kie pli bone kaj utile agi: ĉu en SEJM aŭ en propra klubo? Ni povas rekte diri: certe, en la klubo. Se la klubo estas aktive aganta, ĝi donas pli da utilo ol aktive aganta TC-estro Kogan. Ni (SEJM) estas fortaj per niaj kluboj. Kaj ĉiam ni devas elekti nur tiel: se fiaskas la klubo - ĵeti ĉiujn fortojn por subteni ĝin, revivigi kaj reaktivigi, ĉar SEJM-kluboj estas nia bazo, apogo. Senĝene lasu la ĝeneralajn okupojn (fakestrecon, komitatanecon) - savu la klubon! Ja la homoj vidas la klubojn, iliajn membrojn, ilian agadon - tio ĉi estas konkretaĵoj. Sed SEJM-on ili ne vidas, ĝi estas jam ĵo artefarita. Komprenu min korekte: mi estimas SEJM-on, deziras daŭran sukcesan koordinadon de la kluba agado en tutsovetia skalo, sed neniam dezirus, ke funkciulo de SEJM forgesus pri E-aga-

do en sia loĝloko. Unuavice li devas pensi pri tio ĉi.

Due, pri la "fenomeno de Sapoĵnikov". Verŝajne, vi jam komprenis, ke mi ne tre fervore plenumas la taskojn de la vicprezidanto kaj preferas laboron en la klubo. Kaj tio, ke nia klubo estas aktiva kaj senĉese evoluanta, helpas al mi... esti SEJM-komitatano. Sentante sub mi bonan praktikan bazon de enklubα aktiveco, mi havas rajton direkti agadon de aliaj E-kluboj aŭ aktivuloj. Jes, ĉio ĉi estas tre malfacila afero, duobla kaj forrabanta la tutan mian libertempon... Tamen mi ja estas esperantisto!

Verŝajne same sin sentas aliaj komitatanoj kaj fakestroj: dezirante labori por siaj kluboj, ili tamen devas plenumi la taskojn en SEJM.

Ĉi-maje mi ellaboris projekton de "Regularo por fakoj de SEJM". La komitatanoj ĝin prilaboris kaj konfirmis. Dum la Konferenco oni eventuale ĝin plu prilaboros kaj definitive aprobos. Sed jam al la Konferenco la fakestroj raportu laŭ la Taksa Demandaro. (Vidu ĉinumere, p. 114 - 116. - La red.)La Taksa Demandaro enhavas multe da poentigataj aktivecoj, kaj tio certe tio devos influi al pli aktiva agado de la fakestroj. Ĝenerale, la Regularo kaj la Taksa Demandaro por socialisma konkurado inter la fakoj de SEJM devos ludi rolon de aktivigilo por la faka agado. Ni esperu.

Mi ne rakontu pri laboro de apartaj fakestroj kaj fakoj, ĉar la raportojn ni prezentos dum SEJM-Konferenco. Mi volas diri nur, ke dum niaj konferencoj ni ofte elektas fakestron nur el la vidpunkto de liaj interesoj, sed poste ni vidas neniom da laboro. Do elektante gvidanton, ni memoru, ke temas unuavice pri organizanto de la afero. Duavice - ke li estas amatoro de la afero. Organiza laboro estas tre delikata, temporaba, nedanka, teda , sed bezonata. Tiu, kiu organizas iun agadon, devas: skribi, peti, insulti, denove skribi, denove peti kaj ripeti, denove insulti kaj kontroli, kontroli ĉion, kaj denove... Direkti laboron, instigi al laboro, plani laboron, varbi kunlaborantojn, instrui kaj eduki... Kie estas tiaj fakestroj? Verŝajne ne estas. Sed necesas strebi, ke aperu evoluantaj talentuloj. Oni devas pensi dum elektoj: ĉu vere la homo taŭgas?

Ankoraŭ unu rimarko. La praktiko montris: nur dum niaj tendaroj kaj renkontiĝoj oni povas varbi verajn kunlaborantojn. Do, la fakestroj ne dormu dum niaj E-aranĝoj: kaptu la homojn, klarigu, persvadu, varbu. Per la leteroj kaj anoncoj en SEJM-informiloj ni nenion atingos! Tion ĉi mi konsilas al novaj fakestroj, elektotaj ĉisomere. En la tendaro komenciĝas aktiva fako kaj entuziasma fakestro. Siavice plejmulto da aktivaj fakestroj donas pliajn fortojn kaj elpensemon al la vicprezidanto. Do, ni pensu unu pri la alia, kaj tiam nia komuna agado progresos.

V.Sapoĵnikov, vicprezidanto de SEJM pri fakaj aferoj.

## KAJ EN LA KLUBO, KAJ EN SEJM!

Responde al la rtikolo de M.Bronŝtejn "Ĉu en la klubo aŭ en SEJM?" mi prezentas ankaŭ mian vidpunkton pri la levita demando. Mikaelo opinias, ke nuntempe "SEJM bezonas jam sufiĉe multajn personojn, kiuj okupu sin pri pure movadaj demandoj". Tamen mi opinias male. En nuntempa SEJM aktivas esperantistoj, kiuj laŭ sia kluba membreco kaj SEJM-posteno plenumas kelkajn taskojn. Ilia aktiveco multe dependas de kluba forteco kaj iom de la individueco. Tamen eĉ en forta E-klubo povas esti malaktivaj spertuloj. Do, pensu ni nur pri aktivuloj, strebantaj fordoni siajn fortojn en la klubo kaj en SEJM. Ĉiu SEJM-ano povas doni multajn ekzemplojn de tiaj aktivuloj. Mi mencios nur du: la fakestro A.Gonĉarov nun prezidas Barnaulan E-

klubon; la fakestrino V.Cvetkova gvidas E-kurson en Leningrado, organizas renkontiĝojn kun eksterlandanoj... Interalie, ili ambaŭ reprezentas sufiĉe fortajn E-klubojn.

Do, laŭ mia opinio, tempo por "puraj movadanoj" ankoraŭ ne venis. Eĉ en la impona movada revuo "Esperanto", kiel oni sciigas en ĉi-jara N-868(4), "...provizore ankaŭ nun, kiel en la 70 antaŭaj jaroj de ĉi tiu revuo, 'redakcio' ekzistas nur teorie, ĉar la tutan revulaboron faras plimalpli du homoj, krom aŭ inter siaj aliaj oficejaj taskoj...".

Certe, fortaj E-kluboj povas oferi iun aktivulon por pure faka agado, tamen ĉu tiu aktivulo mem konsentus fari "preskaŭ nulan laboron" por sia klubo? Dubinde! Vera aktivulo, mi opinias, trovos la plej konvenan labormanieron en sia klubo kaj en SEJM. Tiu aktivulo, se li agos konforme al sia klubo, uzante sian specialecon en SEJM, donos eĉ pli multe ol vica movadano. Neniu oponos, ke, dank' al aktiva agado de la fakestro V.Baniulaitis en sia klubo kaj SEJM, klajpedanoj organizas interesajn ekspoziciojn , havas riĉan bibliotekon kaj eĉ okupas la unuan lokon en la socialisma konkurado inter SEJM-kluboj. La samon oni povas diri pri la fakestrino S.Neilande el Riga E-klubo. Ŝiajn korespondadresojn vaste uzas unuavice la samklubanoj. Sendube, niaj samideanoj A.Gonĉarov, V.Cvetkova, V.Baniulaitis, S.Neilande kaj multaj aliaj aktivuloj havas ankaŭ gravajn laborajn kaj familiajn zorgojn. Tamen pro sia bona organizeco kaj fortaj E-kluboj ili sukcesas doni multan utilon al siaj E-kluboj kaj al SEJM samtempe.

Do, por solvi la supremenciitan dilemon de M.Bronŝtejn, necesas unuavice plifortigi kluban laboron - plugi kampon netuŝitan, varbi inter siaj klubanoj simpatiantojn pri sia "tro specialeca" laboro kaj surbaze de tio pli fruktodone aktivi en la klubo kaj en SEJM. Alian vojon mi ne vidas.

A.Kogan (Tiĥvin).

## BONVENON AL LANDO DE MONTOJ!

Dagestano estas lando de montoj kaj monto de lingvoj. Malgranda aŭtonoma respubliko enkalkulas ĉirkaŭ 70 naciojn kaj lingvajn grupojn. Sed Dagestano estas interesa ne nur por lingvistoj, etnografoj.

...La vento de iamaj bataloj vin tuŝas, kiam vi vagas tra Ŝamilaj lokoj en Gunibo. La sunplena tago malheliĝas ĝis duonobskuro en la subtropika densejo de Samura arbaro, travolvita per lianoj. En Derbento estas malfacile retrovi la spiron, kiam oni pririgardas la turojn de unu el la plej antikvaj sur la planedo citadeloj - Narin-Kala, pli ol 2,5 mil jarojn aĝa.

Vojaĝante tra Dagestano, oni nevole komparas la helajn bildojn de tiu ĉi tero kun libro, kies ĉiu paĝo estas neripetebla mondo. La naturo estas malavara je elpensaĵoj. Kaj eĉ multesperta vojaĝanto mutas pro ekmirego, kiam apud la urbeto Izberbaŝ renkonte al li el la ŝtona amaso de la montoj subite aperas la roko "Puŝkin", kiu kun konsterna precizeco kopias la karakteran profilon kaj hararon de la poeto.

La nova tempo postlasas sur la dagestana tero novajn aŭtografojn. Sur la rivero Sulak, post la Ĉirjurta hidroelektrostacio, estas konstruita la Ĉirkeja HES kun kapacito je miliono da kilovatoj.

Uncukul, Gocatl, Kubaĉi, Balĥar - la nomoj de tiuj auloj (vilaĝoj) estas ligitaj kun la plej bonaj atingoj de la nacia arto. Specialan lokon inter la popolaj ĉefverkoj okupas faritaĵoj de la kubaĉiaj stampistoj.

Delonge famas pri gastamo la kaŭkaza tero. "Bonvenon!" - diras la respubliko en sepdek lingvoj al ĉiuj, kiuj volas ekvidi ĝin per

la propraj okuloj, kiu volas tralegi tiun ĉi mirindan libron.

La lando de revoluciaj kaj laboraj tradicioj, la lando de Gamzat Cadasa kaj Sulejman Stalskij, Efendi Kapijev kaj Rasul Gamzatov Murad Kaĵlajev kaj Ŝirvani Ĉalajev kore invitas vin!

ALDONO DE LA REDAKCIO. Samtempe kun tiu ĉi artikolo, sendita fare de la Prepara Komitato de OkSEJT-20, estas ricevita telefona informo, ke en la tendara programo estas planata renkontiĝo kun la fama poeto Rasul Gamzatov. Kaj ankoraŭ unu interesan aranĝon preparas la organizantoj de OkSEJT-20. Oni decidis la plej aktivajn tendaranojn premii per rajto partopreni I-an Kaŭkazan Esperanto-feriadon, kiu okazos posttendare en formo de aŭtobusa ekskurso laŭ la itinero Krasnodar - Soĉi - Gagra - lago Rica. Pli detalan informon pri la aranĝo legu en "Kurte". Ĉi-sube la legantoj povas konatiĝi kun la sperto de krasnodaraj esperantistoj pri organizo de aŭtobusaj E-grupvojaĝoj.

## PRI VOJAĜOJ-RENKONTIĜOJ

Mi volas rakonti pri niaj aranĝoj, kiuj estas io nova en la E-agado por nia lando. Temas pri 4 esperantistaj vojaĝoj-renkontiĝoj per speciala buso ŝildita "Esperanto". Ili estis organizitaj laŭ mia propono kaj gvido kaj pasis tre sukcese, al ĉiuj partoprenintoj plaĉis. Oni nun demandas, kien ni denove simile veturos.

Ni veturis 300 km ĝis Soĉi per bona buso, dumvoje ni parolis en Esperanto kaj kantis. Mi iom rakontis pri la preterveturitaj lokoj, ĉar mi estis dum 4 jaroj ekskursgvidanto en tiuj lokoj. En Soĉi ni havis renkontiĝon en tiea E-klubejo sub gvido de V.Bespalov.

Dum la 1-a veturo (la 24-an - 25-an de oktobro 1977) ni vizitis la lagon Rica, Nov-Afonan kavernon, parkojn en Soĉi, noktis en Picunda. Dum la 2-a vojaĝo ni vizitis en Soĉi stereokinejon, varieteon (interkona vespero), bildgalerion, parkojn. Dum la 3-a, tre sukcesa renkontiĝo (15-an - 16-an de aprilo), kiun partoprenis ankaŭ du E-istoj el Maĥaĉkala , ni havis vizitojn al Arbo de amikeco, vidis tie specialan arbon kun 6 E-greftoj, fotiĝis ĉe la arbo. Krom la jam pli frue vizititaj lokoj, ni estis ankaŭ sur Aĥun-monto kaj en Hosta. La lasta, 4-a renkontiĝo-vojaĝo okazis la 19-an - 21-an de majo: ni kun soĉianoj veturis al Elbrus! Ni atingis la alton 3500 metrojn kaj fotiĝis tie kun la E-flago. Ni estis ankaŭ sur Ĉeget-monto (3060 m) kaj ĉe la monumento de Lermontov en Pjatigorsk.

Resumante nian sperton, mi volas paroli pri signifo de la vojaĝoj-renkontiĝoj kiel nova formo de E-aranĝo, kiun oni uzu en siaj urboj. Ĉu ne estas interese veturi per speciale ŝildita E-buso al samideana E-klubo en alian urbon, regionon, respublikon, por havi tie utilan renkontiĝon kaj samtempe viziti belajn, interesajn lokojn? Tion ĉi oni povus fari, ŝajne, en multaj urboj, kie estas 30 - 50 anoj de E-klubo. Dum tiuj veturoj oni penu paroli nur en Esperanto, estas ja praktiko.

...La buso veturas, multaj rigardas konsternite la ŝildojn "Esperanto", "Krasnodarskaja organizacija esperantistov", "Kursi izuĉenija meĵdunarodnogo jazika Esperanto". sur la busfenestro. Oni povas preni kun si ankaŭ iom da neesperantistoj, ĉar ilin eblas esperantigi post la vojaĝo, tiel granda estas propaganda efiko de la aranĝo. La 2-an renkontiĝon (la 14-an - 15-an de januaro) partoprenis 12 neesperantistoj, kaj 7 el ili post la reveno komencis lerni Esperanton en niaj klubaj kursoj. Post la 3-a renkontiĝo eklernis la lingvon 1 homo, sed serioze.

Pri nia 1-a veturo aperis foto kun subskribo en "Bulgara Esperantisto" N-1. Tio estas bona informo pri nia nova E-aranĝo, ĉu ne? Eksterlande oni ofte kutimas veturi aliurben, alilanden per speciala E-buso, sed ĉe ni tio ne estas ofta afero. Do oni pripensu eble-

cojn organizi tiajn vojaĝojn-renkontiĝojn en E-rondo al aliurbaj samideanoj. Eble ie oni ion similan faras, tiam oni bonvolu skribi al mi por spertoŝanĝo: 350000 Krasnodar-glavpoĉta, do vostrebovanija, Ivasenko Anatoliju Ivanoviĉu.

Mi volus esprimi per "Aktuale" grandan dankemon al V.Bespalov pro la grava helpo pri organizo de programeroj de niaj aranĝoj en Soĉi.

A.Ivasenko (Krasnodar).

## ALDONE PRI LA SAMA TEMO

Kun apero de A.Ivasenko en Krasnodara E-klubo multe pliviglîĝis ties agado. Anatolo estas profesia ekskursgvidanto kaj bona esperantisto. Estante vicprezidanto pri kulturaj aranĝoj, li proponis al la klubo novan tipon de agado: ekskursoj tra Kaukazio kaj interurbaj renkontiĝoj kun aliaj E-kluboj. Ankaŭ mi ĉiam strebis al bonaj kontaktoj inter kaŭkazanoj, precipe min interesis Krasnodaro kiel nia administra centro; tamen antaŭaj miaj klopodoj starigi bonajn kontaktojn kun Krasnodara E-klubo estis ne tre sukcesaj.

Sed kiam mia bona multjara amiko A.Ivasenko transloĝiĝis en Krasnodaron, miaj interrilatoj pliviglîĝis. Oktobre 1977 A.Ivasenko aranĝis E-ekskurson tra Kartvelio kaj invitis ankaŭ soĉiajn esperantistojn. La multimpresan vojaĝon kronis renkontiĝo en E-klubo de Soĉi, kie krasnodaranoj prezentis al la mastroj etan E-koncerton. Januare okazis la dua E-renkontiĝo kaj aprile la 3-a - ambaŭ jam en Soĉi. La trian renkontiĝon partoprenis ankaŭ gastoj el Maĥaĉkala, A.Junusov informis pri preparado de OkSEJT-20. Maje okazis la 4-a E-renkontiĝo: soĉianoj venis al Krasnodaro kaj kune kun tieaj esperantistoj veturis al Elbruso sub gvido de A.Ivasenko, kiu estante bona profesia ĉicerono interesege rakontadis pri ĉiuj dumvojaj vidindaĵoj. Li estas ankaŭ inventema esperantisto: dum la tuta vojaĝo tien kaj reen la majstre amuzis ĉiujn, elpensante diversajn ludojn. Ĉiufoje dum la renkontiĝoj la krasnodaranoj uzis luksan inturistan aŭtobuson kun konstantaj duflankaj E-ŝildoj, kiuj elvokis dum la haltoj multajn demandojn.

Ĉi-jare du krasnodaranoj iĝis individuaj SEJM-subtenantoj, kaj ni esperu, ke baldaŭ, eble dum ĉi-jara Konferenco, ties klubo jam kandidatiĝos al SEJM, ĉar ĝi havas en siaj vicoj multajn gejunulojn, inter kiuj estas vera esperantisto kaj aktivulo A.Ivasenko. Do ni bondeziru al la nova E-klubo sukcesojn en ĝia agado.

V.Bespalov, partopreninto de ĉiuj 4 E-renkontiĝoj (Soĉi).

## KVARA KONFERENCO DE UKRAINIAJ ESPERANTISTOJ

La 7-an - 9-an de majo en Kievo okazis la IV-a konferenco de ukrainiaj esperantistoj, dediĉita al la 33-jara datreveno de la Venko kaj al la 20-jara jubileo de la postmilita renoviĝo de E-movado en Kievo. La konferenco estis organizita de Kieva E-klubo "Ora pordego" kaj pasis en la klubo "Konstruisto", kie konstante funkcias la E-klubo. La E-konferencon partoprenis 78 personoj el 16 urboj kaj loĝlokoj de Ukrainio: Kievo, Ĥarkovo, Poltavo, Odeso, Lvovo, Zaporoĵje, Jalta, Sebastopolo, Ĥmelnickij, Ĥersono, Donecko, Lucko, Avdejevka k.a. Venis ankaŭ gastoj el Rostov-Don kaj Ŝaĥti.

La 7-an de majo okazis solena malfermo de la konferenco. Ĝin anoncis per kurta parolo prezidanto de la klubo "Ora pordego" M.Lineckij. Pri la postmilita E-movado en Kievo koncize raportis sekretario de la E-klubo V.Miŝĉenko. La konferencon salutis J.Vasiljeva el Rostov-Don, V.Pacjurko el Pustomit, A. Lozovaja kaj L. Gridin

el Ĥarkovo, D.Kolker el Zaporoĵje, S.Vajnblat el Odeso, V.Noĉovkin el Poltavo kaj aliaj. Al la klubo-mastro "Ora pordego" estis prezentitaj donacoj.

Al la konferenco venis multaj saluttelegramoj. Ilin sendis: Zoja Kocjubinskaja (nepino de M.M.Kocjubinskij), Diana Petrinenko (popola artistino de Sovetunio), la familio de Ostap Viŝnja, Leonid Viŝeslavskij (poeto), Vasil Minko (verkisto), la societo "Scio" ĉe la uzino "Arsenal" kaj aliaj.

En studenta kafejo okazis interkona vespero. Programo de la vespero, kompilita de M.Lineckaja, estis enhavriĉa kaj diversflanka. Precipe plaĉis al ĉiuj E-kantado de odesa grupo. Estis ankaŭ dancoj, deklamado de E-tradukaĵoj kaj originalaj verkoj, ludoj kaj loterio.

La 8-an de majo okazis spertinterŝanĝa seminario. La unua parolis veteranino de E-movado el Lvovo Isidora Sidorovna Vološĉak, kiu rakontis pri sia partopreno en la 8-a Universala Kongreso en Krakovo en 1912. Tiam ŝi estis 15-jara knabino. Dum la Kongreso ŝi mem vidis kaj aŭskultis d-ron L.Zamenhof. Ŝi memoras renkontiĝon dum la UK kun unu "rusa advokato-socialisto", vizitinta la Kongreson kaj interalie konversaciinta kun la knabino. K-dino Vološĉak certas, ke tiu homo estis V.I.Lenin, kiu tiutempe loĝis en Krakovo. Ŝi diris, ke ŝi estas tre feliĉa pro la partopreno en la 8-a UK kaj konversacio kun V.I.Lenin. Poste k-dino Vološĉak atentigis la gesamideanojn pri prononco de la sono "l": ŝi mem aŭdis, ke L.Zamenhof ĉiam prononcis "l" mole. Ŝi donacis al "Ora pordego" fotaĵon pri la 8-a UK.

La konferencon salutis Jurij Ivanoviĉ Nazarenko, ukraina verkisto kaj ĵurnalisto, iniciatinto de la postmilita renovigo de E-movado en Kievo. Li alvokis ĉiujn partoprenintojn pli ofte sin turni al nia gazetaro por propagandi Esperanton. Estis voĉlegita salutletero de M.B.Cimberov el Jalto, en kiu li informis pri E-agado en sia urbo. A.B.Rogov el Ĥmelnickij rakontis pri sia laboro kiel redaktinto de "Amikeco". Li proponis rekrei la revuon "Ukraina stelo". Parolis ankaŭ L.Gridin el Ĥarkovo, V.Noĉovkin el Poltavo, S.Vajnblat el Odeso.

La saman tagon okazis literatura vespero, dum kiu estis voĉlegitaj versaĵoj, rememoroj, fragmentoj de prozo en Esperanto.

La 9-an de majo okazis seminario pri E-instruado. D.Kolker rakontis pri E-korespondkurso en Zaporoĵje kaj pri sia sperto. A.B.Rogov prelegis pri la Esperanta afiksaro kaj pri uzado de ludoj (loto, domeno k.s.) por E-instruado. A.Vološina el Lvovo raportis pri preparado de antologio de ukraina literaturo en Esperanto. Fine okazis konkluda kunsido kaj komuna fotado.

La konferenco unuanime akceptis jenajn decidojn:

1. Konsideri la konferencon sukcesa kaj aprobi la financan raporton.
2. Reaktivigi USEA, modifinte ĝian strukturon konforme al kondiĉoj.
3. Konsideri utila la seminarion pri E-instruado kaj rekomendi al E-instruistoj aktive kontakti kun Instrua fako de SEJM.
4. Daŭrigi preparadon de ukraina antologio kaj ĉiuflanke subteni la aranĝon.
5. Proponi al SEJM organizi eldonan fakon.
6. Esplori eblecon aranĝi la V-an konferencon ĉi-jare aŭtune.

M.Oĥotin (Krimeo).

---

LASTMOMENTE - LASTMOMENTE - LASTMOMENTE - LASTMOMENTE - LASTMOMENTE

Al SEJM-sekretario venis ankoraŭ unu raporto por la unua periodo: la klubo de Rostov-Don havas 169 poentojn (vidu p. 111 - 112).

## ESPERANTO APERAS SUR LA SCENEJO

Fine de aprilo en Novosibirska Akademia urbeto unuafoje okazis "Konferenco pri problemoj de internacia edukado de junularo", organizita de Novosibirska ŝtata universitato. Ni en Barnaul eksciis pri ĝi dank' al informo ricevita de Altaja ŝtata universitato (AŜU). Ambaŭ niaj prelegoj estis akceptitaj: unu de la universitato kaj la alian mi proponis de la korespondа tekstila instituto. La temon de mia prelego mi prezentis senkaŝe: "El sperto de uzo de la internacia lingvo Esperanto en internacia edukado de junularo".

Dum la konferenco, krom eksterlandaj oratoroj, parolintaj ĝenerale pri la temo, elpaŝis ĉirkaŭ dek gvidantoj de KID-oj. Niajn prelegojn oni lasis al la fino de la konferenco. Tio estis ne malbona, ĉar estis jam konvena fono de antaŭaj paroloj, kiuj plejparte aŭ teoriumis aŭ rakontis pri malfacilaĵoj en la laboro. Kiel la ĉefa rakonto pri uzo de Esperanto en internaciisma edukado de junularo estis mia elpaŝo pri la 14-jara laboro de Barnaula E-klubo, ĝin sekvis paroloj de J.Vdovin el AŜU kaj I.Borodin el Krasnojarska ŝtata universitato. Akompane estis prezentita negranda ekspozicio.

La efiko estis granda. Plej multe da demandoj - al ni, plej multe da petoj pri helpo - ankaŭ al ni. Oni miris, kiel trafe Esperanto solvas la problemon de lingvo-ekposedo, la problemon de korespondado.ktp. Pluraj esprimis deziron lerni la lingvon, kaj ni donis al ili adreson de E-korespondaj kursoj.

Kune kun la antaŭpasintjara elpaŝo de esperantistoj el Ustj-Kamenogorsk kaj Talgar dum simila konferenco en Alma-Ata, nia elpaŝo plifirmigis la estimon al Esperanto en komsomolaj kaj internaciedukaj instancoj. Post jaro en Novosibirsk denove okazos tia konferenco. Do, kuraĝaj E-kluboj de Siberio kaj ekster ĝi povus partopreni per siaj prelegoj.

A.Gonĉarov (Barnaul).

## KION DONAS AL NI KUNLABORO?

En laborplano de nia klubo por ĉi tiu jaro estas unu punkto: la 13-an de novembro - renkontiĝo kun anoj de klubo de internacia amikeco "Torĉo" de Perma politeknika instituto. Ĝuste tiu ĉi renkontiĝo donis al nia laboro novan, ĝis nun ne praktikitan direkton: komenciĝis kunlaboro inter du kluboj de internacia amikeco.

En decembro 1977 dum komuna kunsido la konsilantaroj de KIA "Esperanto" kaj KIA "Torĉo" pridiskutis kaj akceptis planon de kunlaboro por la lernojaro 1977/78. Laŭ tiu plano KIA "Esperanto" devis organizi E-kurson en Perma politeknika instituto kaj vesperon de internacia amikeco, KIA "Torĉo" prenis respondecon pri prelegoj pri internacia junulara movado por la klubanaro de "Esperanto". Plenumante la planon, la 20-an de februaro nia klubo komencis la kurson de Esperanto. Al la kurso, kiun ekgvidis S.Noskova, aliĝis ĉ. 30 studentoj, plejmulto el ili - anoj de "Torĉo".

Subtenante intimajn ligojn kun PPI-anoj, ni povis konstante partopreni en aranĝoj, organizitaj de KIA"Torĉo" en la instituto kaj en la urba skalo. Inter tiuj entreprenoj estis konkurso de politika afiŝo, konkurso "Kion vi scias pri Usono?", konkurso de politika kanto.

La plej grava momento de la kunlaboro estis vespero, dediĉita al Tago de internacia solidareco de junularo kaj al la XI-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Havano. La vespero okazis la 23-an de aprilo en Kulturpalaco nome de Lenin. Ĝia interesa, varia programo estis rezulto de komunaj klopodoj de la du kluboj. Ĉiu partopreninto de la vespero estis atestanto de tradicia rito de esperantistiĝo. Esperantistiĝis la finintoj de kursoj en Kulturpalaco nome de Lenin kaj en Perma politeknika instituto. Brulas kandeloj,

sonas muziko de orgeno, bakalaŭro legas la ĵuron de esperantisto, kaj ĉiu inicato ripetas severajn, solenajn vortojn de la ĵuro. La rito impresis ĉiujn partoprenintojn de la vespero. Sed certe la plej feliĉaj estis la ĵusbakitaj esperantistoj.

La koncerta programo havis interesajn artnumerojn, inter kiuj dominis programeroj en Esperanto. La geklubanoj de "Torĉo" spektis ilin kun granda intereso kaj atento, ilin ravis kaj mirigis la beleco kaj fleksebIo de la lingvo. Fine de la vespero Esperanto iĝis viva lingvo de amikeco, fortika kaj vera amikeco inter samideanoj. Ĉe la adiaŭo aŭdeblis E-frazoj, prononcataj de neesperantistoj. Al ili tre plaĉis la lingvo, kaj ni kun certeco povas diri, ke nia komuna vespero estis ne nur reciproke utila por ambaŭ kluboj, sed ankaŭ bona rimedo de E-propagando.

Unu el lastaj kunsidoj de la klubo ni dediĉis al analizo de la farita laboro kaj resumis ĝin. Dum la kunsido estis ankaŭ aprobitaj labordirektoj por la estonta jaro. Ni decidis daŭrigi kaj disvastigi la kunlaboron kun KIA-j de nia urbo. Unue, disvastigi kaj fortikigi la amikajn ligojn kun KIA "Torĉo": organizi E-kurson en PPI, prelegi pri Esperanto kaj E-movado en la instituto, partopreni la aranĝojn de KIA "Torĉo". Due, renkontiĝi kaj pridiskuti perspektivojn de komuna laboro inter nia klubo kaj KIA de Perma medicina instituto (organizi E-kurson tie). Laborante en tiu direkto, ni propagandas Esperanton, konatigas kun ĝi KIA-anojn, malfermante por ili novajn vojojn de internacia laboro.

Konklude ni volus esprimi jenan opinion. En ĉiu urbo estas krom E-kluboj ankaŭ aliaj kluboj de internacia amikeco. Pro kio ni ne subtenas ligojn kun ili? Ja se pripensi, ni kaj ili havas la samajn taskojn, nur metodoj kaj rimedoj por la internacia edukado de sovetianoj estas diversaj. Do ni ne forgesu pri ekzisto de tiuj KIA-j, des pli ne starigu nin super ili. Ni serĉu ĉiun ebleton por kunlabori kaj per tio disvastigi nian agadon. Esperantistoj kaj E-kluboj nur gajnos de tio. Ni devas montri kaj pruvi al aliaj KIA-j, ke la internacia lingvo Esperanto estas bonega rimedo de internacia laboro kaj ke la studado de Esperanto ne malhelpos, sed kontraŭe - nur helpos al ili en tiu laboro. Krom tio, scio de Esperanto ankaŭ pli-altigos aŭtoritaton de ĉiu internaciisto.

Konsilantaro de Perma KIA "Esperanto".

## PRI NIA SPERTO EN ĜEMELURBAJ KONTAKTOJ

Ĥarkovo havas tri ĝemelurbojn: Poznan (Pollando), Bologna (Italio), Lille (Francio). Proksimume en 1970 ni decidis ligi kun ili kontaktojn.

Pri du urboj ni malsukcesis: en Lille esperantistoj evitis kontaktojn (eble pro la forta oficiala kontraŭsoveta propagando), en Poznan E-organizaĵo fakte ne laboras. Do, nur esperantistoj el Bologna afable reeĥis, komisiis respondeculon pri korespondo kun Ĥarkovo. Ekviglis interŝanĝo de leteroj, gratulbildkartoj ktp. En leteroj ni priskribis E-agadon, gravajn eventojn en niaj urboj, sendis albumojn kun fotoj pri la urboj.

En 1973 Ĥarkovon oficiale vizitis delegacio el Bologna, estis solene organizita semajno Ĥarkovo - Bologna. La estro de la bolonja delegacio - la urbestro, komunisto Dzagneri favoras al E-movado kaj enigis en la delegacion esperantistinon Gamberini. Ni aranĝis por ŝi oficialan akcepton en la Domo de sciencistoj. La personaj kontaktoj varmigis niajn rilatojn, kaj reveninte en Italion Gamberini presis favoran artikolon pri Ĥarkovo en itala E-revuo. Nia urbestro ricevis inviton, ke ni oficiale venu al Bologna, sed eluzi ĝin ni ne sukcesis.

Ĝis nun niaj rilatoj daŭras sukcese. Bedaŭrinde, pro neaktiveco de niaj klubanoj fiaskis persona korespondado. Estis fuŝita ankaŭ provo inde organizi kolektivan korspondadon. Ni per kluba mono abonis por unu kamarado la urban ĵurnalon, por ke li, eluzante interesajn materialojn pri la urba vivo, verku leterojn. Li ne faris tion.

Resumante la temon pri rilatoj kun ĝemelaj urboj, laŭ nia sperto mi povas aserti:

1. Eblecoj de la rilatoj aspektas grandioze: reciproka konatiĝo, ricevo de diversaj materialoj, starigo de kontaktoj kun aliaj ĝemelurbaj organizaĵoj pere de esperantistoj (niakaze kun urbestraro), reciproka vizitado.

2. Ne estas tute facile allogi esperantistojn en ĝemelaj urboj al konatiĝo. Tio ne sekvas aŭtomate.

3. Nia neoficiala pozicio en Ĥarkovo ne permesis al ni plene eluzi eblecojn de p.l. La urbaj instancoj malplezure rilatis al niaj ligoj. Eble baldaŭ tio ŝanĝiĝos.

4. Plej malfacile estas fari la kolektivan korespondadon vere kolektiva, ĉar verdire plimulto da klubanoj ne interesiĝas pri la korespondado. Dum ni toleros en la kluboj flankajn personojn, ĉiuj iniciatoj ne havos rezultojn. Sed tio estas jam alia temo.

Fine mi memorigas du gravajn datojn: 1) 30-a de aprilo - la Tago de ĝemelurboj; 2) lasta plena semajno de februaro - la Semajno de Internacia Amikeco.

J.Lupickij (Ĥarkov).

## PRI LA AMIKECO INTER LVOVAJ KAJ PEĈAJ ESPERANTISTOJ

Laŭ iniciato de s-ino Elizabeta Pallos - estrino de Teritoria Komitato de Hungara E-Asocio en Pecs - en marto 1977 estis establita fruktodona kontakto inter du urboj-ĝemeloj - Lvovo kaj Pecs. Ekde tiu tempo lvovaj kaj peĉaj esperantistoj konstante korespondadas, la kluboj interŝanĝas informojn pri laboro, librojn ktp. De la hungaraj amikoj ni ricevis kelkajn lernolibrojn ("Esperanto-1" de d-ro Istvan Szerdahelyi), "Sciencajn Komunikaĵojn", "Turistan kantaron", "Turistan kalendaron por 1978", multajn gvidfolietojn pri Hungario kaj Pecs. Ni sendis al ili "Gvidlibron pri Lvovo", kelkajn ekzemplerojn de "La mastro de Kôrboja" kaj informon pri niaj vesperoj.

Peĉaj esperantistoj organizis en sia urbo interesan konkurson pri la temo "La Granda Oktobra socialisma revolucio kaj Esperanto" kaj sendis al ni fotojn de plakatoj, kiuj estis prezentitaj por la konkurso. Lvovanoj ĉi-februare organizis en la klubo "Hungaran vesperon". Dank' al materialoj, ricevitaj el la frata urbo, nia klubano R.P.Dzedzik faris tre interesan prelegon pri la urbo Pecs kaj E-movado en Hungario. Dum la vespero sonis hungaraj versaĵoj kaj kantoj esperantlingve. La vesperon partoprenis hungaraj studentoj el Lvova politeknika instituto. Ili kantis la tradician studentan kanton "Gaudeamus igitur" kaj hungarajn popolajn kantojn.

Ni ricevis el Pecs inviton partopreni la Semajnon de Internacia Amikeco kaj planas en sekva jaro viziti la ĝemelan urbon. Ni esperas, ke personaj kontaktoj kaj senperaj interkonatiĝoj helpos arangi interesan kaj utilan kunlaboron por nia grava komuna afero: per Esperanto por amikeco inter niaj popoloj.

A.Koroleviĉ, estro de Lvova E-klubo.

---

DEZIRAS KORESPONDI kun samprofesiuloj 25-jara dentistino: Hanne MACH, Ośrodek Zdrowia, PL-66-432 BACZYNA, Pollando.

## APARTAN ATENTON AL PACDEFENDA LABORO!

Ĉe Junulara komisiono de Moskva Pacdefenda Komitato ĵus estas fondita Esperanto-sekcio. Konsiderante perspektivojn de nia kunlaboro kun Sovetia Pacdefenda Komitato en tutlanda skalo, ĉiuj kluboj de SEJM aparte atentu la pacdefendan laboron. Por tio necesas elekti personon, respondecontan pri tiu laboro en la klubo. Donitaĵojn (nomon kaj adreson) pri la respondeculo bonvolu venigi al SEJM-Konferenco aŭ sendi ĝis la 15-a de julio laŭ la adreso: 107564 Moskvo, Krasnobogatirskaja 27 - 122, Perevalovu Dmitriju Aleksandroviĉu. Ni ankoraŭfoje atentigas esperantistojn pri ĉiuflanka graveco de nia pacdefenda agado.

E-sekcio ĉe Junulara komisiono de Moskva Pacdefenda Komitato.

## ABONU "VEK XX I MIR"!

Ekde la 7-a numero ĉi-jara ni penos sufiĉe regule aperigi E-novaĵojn en la bulteno de Sovetia Pacdefenda Komitato "Vek XX i mir", kiu aperas en la rusa, angla, franca, germana kaj hispana lingvoj. Ĉiu esperantisto-pacbatalanto devas havi ĉi tiun revuon. SEJM-anoj, ĉu klube, ĉu persone, abonu ĝin! Alilingvajn eldonojn de la revuo estus utile sendi al viaj eksterlandaj geamikoj. Tio helpos al ili pli aktive partopreni la pacmovadon. La abonoj akcepteblas en ĉiu poŝtejo. "Vek XX i mir" helpos al vi iĝi vere aktiva esperantisto-pacbatalanto.

D.Perevalov, reprezentanto de la Komisiono
pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj
en Sovetia Pacdefenda Komitato.

## PRI SOVETA SEKCIO DE IAdEM

En "Kurte" kaj "Aktuale" jam estas anoncite pri la ekzisto de de Soveta Sekcio de Internacia Asocio de Esperantistoj matematikistoj. Reale tio signifas, ke certa nombro da matematikistoj-esperantistoj aliĝis al IAdEM kaj komencis praktikan agadon en la sfero de apliko de Esperanto en matematiko. Tamen aperis bezono pli strikte kaj definitive difini la internan strukturon de la Sekcio, ĝiajn interrilatojn kun aliaj E-organizaĵoj kaj manieron de kunordigado de ĝia agado - alivorte, formale kaj oficiale organizi la Sekcion, por ke ĝia agado estu pli efika kaj fruktodona.

Tial la IAdEM-grupo en Gorkij dissendis al esperantistoj-matematikistoj en Soveta Unio cirkuleran leteron, entenantan kvar demandojn: 1) Ĉu Vi konsentas, ke Soveta Sekcio de IAdEM devas esti aganta organizaĵo? 2) Ĉu Vi konsentas, ke Soveta Sekcio de IAdEM devas agadi laŭplane en ligo kaj kontakto kun Scienc-Teknika fako de SEJM kaj ties Terminologia Centro? 3) Ĉu Vi konsentas, ke, por ordigi la internan agadon kaj difini la interrilatojn kun aliaj organizaĵoj, Soveta Sekcio de IAdEM devas prepari kaj akcepti propran Statuton? 4) Ĉu Vi konsentas, ke ĉiuj membroj de Soveta Sekcio de IAdEM pagu iun membrokotizon? Estis ankaŭ demandoj pri la agadplano k.a.

Estas menciinde, ke ĉiuj ricevitaj respondoj estis senescepte pozitivaj. Sed ankoraŭ ne ĉiuj respondis al la starigitaj demandoj, tio tre bremsas la tutan aferon. Tial ni alvokas ĉiujn legantojn de "Aktuale", kiuj povus aliĝi al la Sekcio, akcepti la kvar menciitajn demandojn kiel direktitajn senpere al ili kaj sendi la respondojn al la sekretario de Gorkia IAdEM-grupo Beŝkarev Viktor Pavloviĉ: 603137 Gorkij P-137, pr. Gagarina 222 - 95.

La cirkulera letero entenis ankoraŭ unu demandon: Al kiu Vi komisius verki la Statuton? Ne ĉiuj respondis al la demando, sed ĉiuj respondintoj esprimis deziron, ke la Statuton preparu por posta pridiskuto la IAdEM-grupo en Gorkij. La deziro estas plenumita: la projekto de la Statuto estas verkita kaj preta por vasta pridiskuto. Petu tekston de la statutprojekto, sendu demandojn, proponojn, rimarkojn ktp. al la sekretario de Gorkia IAdEM-grupo. Ni alvokas ĉiujn estontajn membrojn de Soveta IAdEM-Sekcio aktive partopreni la pridiskuton.

Ĝis la momento, kiam nova gvidantaro de la Sekcio estos elektita laŭstatute, la agadon provizore gvidas la IAdEM-grupo en Gorkij. Ĝi ellaboras nun formon de aliĝilo kaj "Regularon de la reelektado". Ambaŭ dokumentoj estos dissenditaj al ĉiuj personoj, kiuj esprimas deziron aliĝi al la Soveta Sekcio de IAdEM.

V. Beŝkarev (Gorkij).

## NI NE PERDU LA ESPERANTISTAN ETOSON

Laŭ mia opinio, "nur esperantisto" ne estas "genia, sed nenormaleco", kiel deklaras V.Ŝilas en la artikolo "Ne nur el lingva vidpunkto" ("A" N-8). Estas kompreneble, ke oni ne povas dum tutaj diurnoj okupiĝi pri Esperanto. Sed ĉiuj dumtendaraj aranĝoj devas havi almenaŭ tiun rilaton al la lingvo, ke ili nepre estu en Esperanto. Kaj tute ne necesas doni apartan signifon al turismo, boatado, fiŝkaptado ktp. Ili povas ludi nur helpan rolon kaj ne devas forrabi tutan tempon kaj fortojn. Eble mi eldiras banalaĵojn, sed el propra sperto mi scias, ke ne ĉiuj esperantistoj komprenas diferencon inter E-aranĝoj kaj iuj ajn aliaj.

Jen freŝa ekzemplo. Dum la majfestaj tagoj mi partoprenis vican CRRER-17. Ĝi okazis apud Tula en turismaj kondiĉoj (tendoj, dormosakoj, komuna kaldrono, fajro por kuirado ktp.). Sed la lingva nivelo de la renkontiĝo estis tre malalta. Terure krokodilis ne nur komencantoj, sed eĉ spertaj esperantistoj, kiujn mi memoras bone paroli en OkSEJT-19. Kio kaŭzis tion? Verŝajne tiuj krokodilintoj sentis neniun respondecon pri la lingva nivelo de la aranĝo. Kaj se neniu rememorigis al ili pri E-spirito kiel ĝia distinga eco, ili mem trankvile fuŝis la lingvan etoson. Kun la sama sukceso ili povus partopreni iun alian turistan kunflugon.

Kaj male, dum OkSEJT-19, kie oni parolis pri Esperanto pli multe ol pri aliaj aferoj, la lingva nivelo estis multe pli alta (kvankam ankaŭ tie svarmis "krokodiloj"). Kaj interalie, tie ĉeestis bonegaj esperantistoj, tute nespertaj pri turismo.

Do, konkludo jenas. Estu naturo, estu turista PP, fiŝkaptado, boatado ktp., sed antaŭ ĉio ĉi ni estas esperantistoj, kaj ni ne forgesu tion eĉ por unu momento!

B. Granat (Voroneĵ).

## PER OKULO DE SKRUPULULO

Pro neoftaj parolaj kontaktoj kun alilingvanoj, aŭ pro promesita facileco de la lingvo, oni ofte ne kontrolas sin kaj uzas kvazaŭgustajn nepripensitajn esprimojn. Havante kritikeman karakteron, mi iom meditis kaj ekmemoris la sekvajn.

"Konata kun" - estas pura rusismo. Je en Esperanto pasiva participo postulas post si la prepozicion "de". Komparu la sinonimon "scii", oni neniam uzas "sciata kun" en la supozata senco. Iom abstrakciu, kaj vi komprenas, kion signifas la ofte uzata esprimo inter la ruse parolantoj. "Mi estas konata kun li" - do mi kaj li estas konataj de iu tria persono. La normala uzo estas: "konata perso-

no", "konota fianĉo", "konita bopatrino". Se oni volas esprimi la konatecon, endas uzi "-n", ekz. "mi konas lin", "mi estis konanta la planon", "vi estas konanta min" k.s.

Ĉar "A" respegulas nian E-lingvaĵon, mi prenas kelkajn ekzemplojn de tie (pardonu min la redaktoro!).

"Elekto de B.Kolker por estreco". La sufikso "ec" signifas ne agon, sed kvaliton. Sed la aŭtoro volis proponi lin por estrado, gvidado, certe pro liaj taŭgaj ecoj.

"Eldoni la kantaron ĝis Novjaro", "kiu aperos ĝis fino de oktobro" - same estas preskaŭ neniam korektata rusismo. "Ĝis" signifas limon: "mi laboros ĝis la 5-a horo" (ne plu), "mi ne renkontos vin ĝis la sekva revido", "ĝis la Novjaro ne atendu donacojn" (poste ili abundos). La parolanto promesis plej verŝajne "eldoni la kantaron (jam) antaŭ la Novjaro". La alia diris, ke la insigno aperos (jam) antaŭ oktobro.

Oni aĉetas ne "per mono", sed kontraŭ mono. Ja okazas interŝanĝo: mono kontraŭ varo.

Por ne esti miskomprenataj kaj primokataj de la alilingvanoj, ni devas rigore eviti la forte enradikiĝintan kaj tro kutiman vorton "donitaĵo". Ĝi estas filozofa termino. Por la rusa vorto "dannoje" ekzistas tute ĝustaj ekvivalentoj: indico, fakto, trajto, karakterizaĵo ktp.

Konklude - ni studu Esperanton!

E.Perevertajlo (Taŝkent).

KOMENTO DE LA REDAKTORO. Sendube estas ĝojinde, kiam atentema leganto trovas en nia informilo ankaŭ nutraĵon por prilingvaj meditoj. La lingva kulturo de SEJM-anaro estas afero ne malgrava, do "A" devas doni iom da loko ankaŭ al ĉi-temaj demandoj.

La rezonoj de E.Perevertajlo al mi ŝajnis pravaj dum la unua lego. Sed mi ne povis ne rimarki, ke la aŭtoro bazas sin nur sur la propraj lingvaj konceptoj, kaj nenie en la teksto estas eĉ aluda refero al iu E-lernolibro aŭ vortaro. Do ĉe mi aperis natura deziro esplori, kiel do traktas la tuŝitajn demandojn niaj aŭtoritataj fontoj, ekz. Plena Ilustrita Vortaro (PIV). Kaj jen kion mi trovis.

"Konata kun" estas norma Zamenhofa lingvouzo. Sur p. 540 de PIV oni trovas: "mi estas konata kun beletaj aktorinoj" (Z). Evidente, "konata kun" signifas reciprokan konatecon, sed "konanta -n" aŭ "konata de" - unudirektan.

La sufikso "ec" signifas ne nur kvaliton, sed ankaŭ staton (p. 214). Do "estreco" (la stato esti estro) tute ĝuste respondas al la subkomprenata ideo.

Pri "ĝis" jes, ĝi signifas limon. Kaj tiu limo ja klare videblas, se oni promesas "eldoni la kantaron ĝis Novjaro". Jen analoga ekzemplo el PIV, p.367: "ĝi devas esti preta ĝis sabato" (Z).

Ĉu oni ne rajtas "aĉeti per" mono? La vorton "aĉeti" PIV difinas jene (p.6): "1.Akiri kiel propraĵon per pago de mono...2.Akiri per mono la uzon de io..." Estas ekzemplo: "ĉiujn ĉi bienojn li aĉetis per la heredaĵo de sia patro". Nu, se oni povas aĉeti per heredaĵo, do ankaŭ per mono, ĉu ne?

Laste, pri "donitaĵo". Filozofa termino estas ĝia dua senco (p. 203), sed la unua estas "ĉiu el la konataj kvantoj, kiuj konsistigas la bazon de la problemo" - do sufiĉe proksime al "dannoje". Kaj ni ne timu mokojn de alilingvanoj - ili mem uzas tiun vorton. Ekz., "donitaĵo" troveblas en artikoloj de Bernard Golden, usonano loĝanta en Hungario, gajninto de la unua premio pri prozo en Belartaj Konkursoj de UEA: vidu "Heroldon" N-1623(supl), 1629-30, 1632.

Ĉio ĉi certe ne signifas, ke la variantoj, proponitaj de la aŭtoro, estas malkorektaj: plejparte ili estas tute taŭgaj, ja nia lingvo estas sufiĉe fleksebla. Sed ili ne estas sole korektaj.

Do studu ni Esperanton, tamen ne laŭ eldiroj de tro memfidaj "orakoloj", sed laŭ verkoj de klasikuloj kaj aliaj vere fidindaj fontoj.

# INFORMILO
## pri la 12-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro

Laŭ decido de SEJM-Komitato la Konferenco okazos apud Moskvo. Ĝi lokiĝos en la turista bazo "Ŝĉerbinka" (je ĉ. 10 km ekster la ĉefurbo) kaj pasos de la 14-a de julio (veno matene) ĝis la 19-a de julio (forveturo matene). Por atingi la lokon necesas veturi de Kurska stacidomo per elektrotrajno ĝis Ŝĉerbinka, de la stacio iri piede ĉ. 3 km direkte al la Simferopola ŝoseo.

La kotizo - 22 rubloj de ĉiu persono (loĝado en dometoj, eventuale parte en tendoj + nutrado en la manĝejo de la turista bazo + organizaj elspezoj) - estas sendenda grupe al Perevalov Dmitrij Aleksandroviĉ: 107564 Moskvo, Krasnobogatirskaja 27 - 122, tel. ofica 298-87-46. Limdato de ricevo - la 6-an de julio. Dorsflanke de la monmandato aŭ en aparta samtempa letero skribu liston de la aliĝantoj.

Aldonajn informojn liveras kaj raportojn de forestontaj SEJM-funkciuloj akceptas Aroloviĉ Viktor Semjonoviĉ: 121019 Moskvo G-19, do vostrebovanija, tel. ofica 111-66-77.

La partoprenontoj kunprenu pasporton, kvitancon pri monsendo kaj ĉion bezonatan por eventuala tendumado.

Bonvolu ne venigi al la Konferenco komencantojn, neesperantistajn familianojn kaj aliajn flankajn personojn.

ORGANIZANTOJ

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

- la ampleksan bultenon de Kolektanta fako "SEJM-kolektanto", kajero unua. En la enhavo: enkonduka artikolo, artikoloj de D.Bartoŝik kaj V.Baniulaitis pri la signifo de E-insignoj, artikoloj de R.Wluka, G.Tremon, R.Haabvere pri E-glumarkoj, materialo "Esperanto en filatelio" kun listo de E-poŝtmarkoj, listo de la fako (79 membroj), abundo da diversaj anoncoj.
- Informbultenon №1(9) de Ukrainia Societo de Esperanto-Aktivuloj. Ĝi estas plene dediĉita al la raporto pri la IV-a konferenco de ukrainiaj esperantistoj kaj enhavas jenajn partojn: ĝeneralaĵoj, salutoj de kulturagantoj, solena malfermo, interkona vespero, seminario pri spertointerŝanĝo, ekskursoj, literatura vespero, seminario pri E-instruado, cetero, decidoj de la konferenco, statistiko de la konferenco, financa raporto por la konferenco, adresaro de la partoprenintoj. Vidu ĉi-numere artikolon de M.Oĥotin (p. 122 - 123).
- projekton de Statuto de Soveta Sekcio de IAdEM, preparitan de la IAdEM-grupo en Gorkij. En la projekto estas jenaj ĉapitroj: preambulo; 1.Nomo; 2.Celo; 3. Kunlaboro kaj interrilatoj kun aliaj organizaĵoj; 4. Membreco, kotizoj; 5.Gvidado; 6.Jarkunvenoj; 7.Perspektivoj; 8.Malfondo. Vidu ĉi-numere artikolon de V.Beŝkarev (p.127-128).

NECESAS KONKRETAJ FAKTOJ

por pruvi la utilon de Esperanto al gvidantaro de Klubo de Internacia Amikeco en Gorkia universitato. La materialojn pri aplikado de Esperanto en KIA-agado (en la rusa lingvo - por prezenti al la neesperantista KIA-gvidantaro) petas Beŝkarev Viktor Pavloviĉ: 603137 Gorkij P-137, prosp. Gagarina 222 - 95.

AL LA AKTIVULOJ DE SEJM - FRUKTODONAN KONFERENCON, SUKCESAJN SEJTojn!

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 21.6.78.
La numerojn 1(45) - 10(54) redaktis V.Aroloviĉ: 121019 Moskvo d/v.